

BOHEMA ESPERANTISTO
ČESKÝ ESPERANTISTA

Měsíčník pro šíření esperanta a esperantismu mezi Čechy.
 Orgán „SVAZU ČESKÝCH ESPERANTISTŮ“ v Rakousku.

Zodpovědný redaktor a vydavatel: Dr. STAN KAMARYT.

Redakce:
 Praha-III, č. 495.



Administrace:
 Jevíčko na Moravě.

ROČNÍK III

SEŠIT 2

Články. — Artikoloj.

H. K. Bouška: Čtvrtá mezinárodní manifestace esperanta. —
 Dro Fr. Krejčí - J. Holub: Signifo de L. N. Tolstoj. — Jos.
 Krumpholtz: Ideo de J. A. Comenius pri la lingvo universala.
 — Leprince de Beaumont - Era: La Belulino kaj la Besto.

Raportoj kaj notizoj.

Universala Frateco. Kultura societo Babel. La uzado de esperanto por la
 korespondado kun fremdularo. Du leteroj (Dokumentoj).

Kronika a komentář.

Šeková banka esperantská. Chilská vláda a esperanto. Cizí esperantisté
 v Praze. První český časopis s esperantským výtahem. Vyučování esperanta
 na škole moderních jazyků. Esperanto na průmyslové škole v Písku. České
 přednášky o esperantu. Veřejné kursy esperanta pro Čechy.

Informace a dokumenty.

Svaz českých esperantistů. Česká společnost esperantistů v Praze. Klub
 esperantistů v Jevíčku.

Libroj kaj gazetoj.

El la historio de esperanto. La rezultato de mia paciga entrepreno. Tra
 la filatelio. The Australian Esperantist. Slovník esperantsko-český.

PRAHA, 15. XI. 08.

Cena 36 h

Vychází 15. dne v měsíci a je zdarma zasílán všem členům »Svazu českých
 esperantistů«, kteří zaplatili celoroční příspěvek 4 K. — Rukopisy, dopisy,
 knihy a časopisy zasílají se redakci. — Netištěné rukopisy se vrátí, byla-li
 přiložena známka na odpověď. — Všecka díla redakci zasláná jsou oznamována.
 Reklamace přijímá administrace jen do vyjití následujícího čísla. — Před-
 pláceti a po číslech odebíratí lze u administrace a ve všech knihkupectvích.

Celoroční předplatné 4 K,

pro členy spolků sdružených ve »Svazu Č. E.« 3 K, jednotlivá čísla po 36 h.
 Zásilky pro »S. Č. E.« adresujte: Dr. Stan. Kamaryt, Praha-VI.

Český Esperantista - Bohema Esperantisto

monata revuo por propagandado de esperanto kaj esperantismo inter Bohemoj, oficiala organo de „**Bohema asocio esperantista**“ (Svaz českých esperantistů), eliras regule la 15-an de ĉiu monato en kajeroj almenaŭ 16-paĝaj enhavante krom bohemaj informaj artikoloj multajn esperantajn, originalajn kaj tradukitajn, amuzajn kaj klerigajn artikolojn kaj notizojn pri temoj aktualaj kaj internaciaj. Jara abonpago 1.70 Sm. *Administracio*: Jevičko, Moravio-Aŭstrio *Redakcio*: Praha, III, 495, Bohemujo-Aŭstrio (J. Iglauer).

La manuskriptoj, leteroj, libroj kaj gazetoj estu sendataj al la redakcio, la abonpago al la administracio. Ĉiuj verkoj en kiu ajn lingvo ricevitaj de la redakcio estas registrataj; recenzioj estas publikigataj pri la verkoj ricevitaj almenaŭ en du ekzempleroj. La redakcio rezervas al si la rajton korekti la manuskriptojn. Represo kaj traduko, se ili ne estas speciale rezervitaj, estas permesitaj, se oni citas nian revuon kaj sendas 3 ekzemplerojn al la redakcio. La redakcio respondas la leterojn sole per la gazeto, ne per la poŝto; kiu bezonas la respondon letere, aldonu poŝtmarkon.

Adresy dopisovatelů. — Adresoj de korespondantoj.

R. Biard, profesoro, Caen-Calvados 18 rue l' Oratoire, Francujo. — Dr. Walter H. Fox, Chicago, 92 state street. — C. H. Butcher, Christchurch, Hazelden Road, New Zealand. — J. Porter, 1 Jennyson Road, Blackpool, Anglujo. — A. E. Evans, London, 8 Bolan, Streed Battersea, Anglujo. — Josif Asaturov, Tiflis, 2 r, Tumanovskaja ul. 38, Kaŭkazo, Rusujo.

Učebné pomůcky pro samouky i kursy.

Vydání malá.

- Sv. 1. **Učebnice Esperanta**. Upravili Th. Čejka a Jos. Krumpholc. — 6. vyd. zcela přepracované. — Cena 20 h, poštou 23 h.
Sv. 2. **Slovníček esper.-český**. Sestavil Th. Čejka. — Cena 20 h, poštou 23 h.
Sv. 3. **Slovníček česko-esper.** Sestavil Th. Čejka. — Cena 30 h, poštou 33 h.
Sv. 4. **Methodická učebnice Esperanta** (mluvnice, cvičebnice a oba slovníčky). Sestavili Th. Čejka a Jos. Krumpholc. — Cena eleg. váz. výt. v kapesním formátu K 1.10, poštou K 1.20.
Slovník česko-esperantský (obsahuje více než 10.000 slov). Sestavil Th. Čejka. Cena 90 h, poštou 95 h.

Vydání velká.

- Sv. I. **Úplná učebnice Esperanta**. Napsali Th. Čejka a Jos. Krumpholc. — IV. vyd. (doplněné). — Cena K 1.50, v eleg. angl. měkké vazbě 2 K, poštou o 10 h více. Obsahuje Zamenhofovo „**Fundamento de Esperanto**“.
Sv. II. **Slovník esper.-český** (podrobný). Sestavil Th. Čejka. — Cena 2 K, v eleg. angl. měkké vazbě 2.50, poštou o 10 h více.
Sv. III. **Slovník česko-esperantský** (podrobný). Sestavuje Th. Čejka.
Sv. VI. **El la historio de Esperanto**. Obsahuje Dr. L. Zamenhofův „Listo pŭvodu Esperanta“ a zajímavou řeč Dra K. Beina a Dra L. Zamenhofa, proslovenou na I. kongresu esperantistů 1905. — Cena 30 h. Spisek tento hodí se znamenitě k dalšímu cvičení v Esperantu, zvláště pro výborný sloh esperantský.

Vedle těchto spisů doporučujeme ještě časopis **Český Esperantista** roč. I. a II. ve sníž. ceně 2 K a **Revuo Internacia** (160 str. poučné i zábavné četby) za 2 K. — Kdo objedná všechny tyto 3 časopisy najednou, obdrží je, pokud zásoba stačí, vyplaceně za K 5.50. — **Všechny objednávky vyřizuje** — však jen po předchozím zapravení obnosu — **TH. ČEJKA, Bystřice-Hostýn, Morava.**

Propaganda. Nejvhodnější pomůckou propagační je „*Esperanto na jednom listě*“. Úplná mluvnice a slovník esper.-český (obsahuje všechna základní slova, na 2000 kmenů, tedy skutečný klíč k Esperantu!) — 1 výt. za 2 h, 10 výt. franko za 20 h, 50 výt. za 55 h, 100 výt. za 1 K, 500 výt. za 3 K, 1000 výt. za 5 K. — Za obnos předem obdržený (i v pošt. známkách) zasílá Th. Čejka, Bystřice-Hostýn, Morava.

ČTVRTÁ MEZINÁRODNÍ MANIFESTACE ESPERANTA.

O IV. mezinárodním kongresu esperantistů pořádaném ve dnech 16.—22. srpna 1908. v Drážďanech referuje H. K. Bouška.

Počátkem měsíce srpna r. 1905 sjelo se v severofrancouzském přístavním městě Boulogne-sur-mer několik set příslušníků dvaceti různých národností z Evropy, Ameriky, Afriky a Asie, kteří zde po deset dní rokovali ve veřejných sezeních a soukromých rozhovorech, bavili se na pořádaných zábavách a vycházkách bez nejmenší překážky, neboť, ač přišli z nejrozmanitějších zemí světa, všichni si rozuměli a rozuměli jazykem jediným — esperantem. Byl to první mezinárodní kongres esperantistů, byl to první vskutku mezinárodní kongres, na němž jednáno bylo jediným jazykem, a to jazykem neutrálním, byl to první mezinárodní kongres, na němž každý účastník své myšlenky mohl říci všem svým posluchačům bezprostředně, bez překladů, na němž každý účastník byl účasten nejen svým tělem, ale i duchem, poněvadž každému mluvčímu ihned a lehce porozuměl, byl to první mezinárodní kongres, na němž žádný národ neskláněl se před druhým, na němž žádný účastník necítil povýšenosti nebo poníženosti své mateřštiny oproti jazykům ostatním. Esperanto přemohlo Babylon! *První mezinárodní kongres esperantistů v Boulogne-sur-mer byl první případ v kulturních dějinách lidstva, kdy ve shromáždění příslušníků nejrůznějších národností všichni účastníci bez námahy si porozuměli a to jazykem, jež vytvořil důmysl lidský. Toť významná kulturní událost v dějinách současných, toť fakt, jehož význam je obrovský, a jestliže před tímto faktem zavírá oči přítomnost, jistě náležitě ho posoudí budoucnost!*

Od té doby každoročně scházejí se esperantisté celého světa, aby manifestovali pro svoji myšlenku. R. 1905. sešli se v Boulogne-sur-mer ve Francii (asi 700 osob), r. 1906. v Ženevě ve Švýcarsku (na 1000 osob), r. 1907. v Cambridge v Anglii (na 1200 osob) a r. 1908. v Drážďanech v Německu

(přes 1400 osob). A každoročně opakuje se týž obraz: v stanoveném městě scházejí se příslušníci nejrůznějších zemí a národností, nejrozmanitějšího povolání a zaměstnání, stoupenčí nejrůznějších směrů, namnoze protichůdných názorů a přesvědčení politických, náboženských, sociálních a humanitních, pěstitelé nejrozmanitějších umění a sportů, a všichni ti lidé nesetkávají se navzájem němě a hlouše, ale rozumí jeden druhému, vždyť všichni mluví jedinou řečí, řečí příjemnou a lahodnou; jeden s druhým mluví jako bratr, jako člen jednoho národa, neboť všichni hovoří řečí neutrální; nescházejí se tu Angličané s Francouzi, Němci s Čechy, Rusové s Poláky, katolíci s evangelíky, křesťané s židy, kteří by ostatním vnucovali svůj jazyk, ale lidé s lidmi, kteří jsou si úplně rovni, kteří stojí na základě neutrálním. Předzvěst nové doby, uskutečnění velikého a krásného snu lidstva!

A celá ta směsice lidí nejrůznějších národností, povolání a přesvědčení jest poutána jedinou ideou, ideou mezinárodního bratrství, ideou všeobecné spravedlnosti a rovnosti, všeobecné snášenlivosti a svobody, krásnou a vznešenou ideou esperantismu. Při každém všeobecném kongresu esperantistů konají se schůze zvláštní, na kterých stoupenci těchže ideí roklují o otázkách jen jim společných, které byly by buď příliš odborné neb nepřípustné se stanoviska neutrality pro všeobecná sezení. Když pak účastníci těchto speciálních schůzí scházejí se opět společně ve všeobecných sezeních, na jedné hostině neb promenádě, všichni srdečně se spřátelí, zapomínajíce v té chvíli na to, co by je mohlo dělit. Srdečně rozmlouvají spolu kněží a volní myslitelé, socialisté a důstojníci, jsouce si vědomi, že jsou především lidmi, pak teprve kněžími, socialisty, vojáky a p. Je to krásný příklad snášenlivosti, povzbuzující obraz toho, jak vysoce povzneslo by se lidstvo, kdyby v sobě potlačilo nízké předsudky národnostní, náboženské, třídní! Je to malý obraz budoucího světa, předzvěst lepší doby!

Tak kongresy esperantistů podávají nám nejen důkaz, že esperanto má přívržence ve všech zemích a všech vrstvách společenských, že vyhovuje úplně a dokonale jako dorozumívací jazyk lidstva, ale ony podávají nám také obraz budoucí doby, doby nové, kdy lidstvo bude provanuto duchem všeobecné svobody, snášenlivosti, spravedlnosti, rovnosti a bratrství, doby, v níž národové na základě jazyka neutrálního budou se dorozumívati, aniž by jeden druhému vnucoval

svůj jazyk, aniž by se jeden před druhým pokořoval, doby, kdy esperanto umožní příslušníkům jednoho přesvědčení neb stejného zájmu, ale různých národností, dorozuměti se jak mezi sebou tak i s jinými.

Červánek nové, lepší doby je na obzoru!

* * *

V druhé polovici srpna byly Drážďany ve znamení zelené barvy: v četných ulicích vlály zelené prapory, na všech rozích a sloupech zelenaly se esperantské plakáty, mnohé firmy zelenou hvězdou a esperantskými nápisy označovaly, že přijaly užívání esperanta, za výklady elegantních krámů zelenaly se kravaty, jehlice, šály a pod. drobnosti, všickni knihkupci vystavovali díla o esperantu nebo v esperantu, veliké zelené nápisy na tramwayích a drožkách označovaly směr k středisku esperantského kongresu, na budově vysoké školy technické obrovská tabule hlásala, že zde je hlavní sídlo kongresové. Zelenou hvězdu mělo i několik — policistů, které esperantu naučil prof. Cart, aby mohli býti nápomocni hostům. Zelená hvězda všitá na rukáv sluhů sv. Hermandady působila značnou pozornost; já sám na poprvé musil býti upozorněn, že ohvězděné rámě spravedlnosti okukuji příliš dlouho. »Popřejte mi toho, slečno,« odbývám upozornění Pařížanky, s níž jsem právě šel, »mám z toho muže radost a našinci se málo kdy stane, aby měl radost z policajta!«

Ulicemi procházely zástupy cizinců, pozorování mnohými zvědavci, kteří na vlastní oči a uši se přesvědčili o »možné nemožnosti«, že příslušníci tolika národů mohou se velice lehce smluviti esperantem. Přes 1400 stoupenců esperanta ze 42 států a národů (mezi nimi asi 50 Čechů) sjelo se tu k letošní manifestaci. Půldruhého tisíce lidí přišlo ukázati, že kvapem blíží se čas, kdy roztříštěné lidstvo se sjednotí, kdy sesunou se zdi vězení, ve kterých držela národy jejich různojazyčnost, že dnes již existuje dorozumivací prostředek, jehož již příslušníci téměř všech civilisovaných národů celého světa užívají ve všech možných oborech.

Kongres konal se za značné zevní okázanosti. Protektorem kongresu byl saský král, čestný výbor tvořili ministři, vyslanci, konsulové a četní státní i městští hodnostáři, některé státy poslaly na kongres oficielní zástupce, v královské opeře se svolením krále sehráno divadelní představení. Stát i město vyšly kongresu vstříc svojí podporou, propůj-

čením státních i městských budov, subvencemi, bezplatnými jízdami tramwayí, drahou, loděmi a jinak.

Střediskem kongresu byly Technische Hochschule na Bismarckplatzu a Vereinshaus v Zinzendorfstrasse. Budova školy technické byla po celý týden cele obsazena esperantisty. Hned ve vestibulu byla veliká tabule, na níž pořadatelstvo činilo svá oficiální sdělení a sdělovalo bohužel příliš časté změny v programu, v postranní chodbě byl útulný buffet, ve velikém sále v pravo byla přijímací síň (akceptejo), v sálech po straně levé byla výstava (ekspozicio) a prodejna (vendejo), aula byla místem hlavních schůzí a ostatní posluchárny byly obsazeny schůzemi odbornými. Zde přijímány přihlášky, udílány pokyny, rozdávány sjezdové lístky, odznaky a publikace, vydávány lístky pro bezplatnou jízdu tramwayí a drahou (biletaro), poukázky na byt a obědy (kuponaro), vstupenky do divadla, byla tu poštovní úřadovna, směnárna a pod. Zde byla rozsáhlá výstava brožur, knih, časopisů, letáků, cirkulářů, katalogů, hudebnin, obrazů, map a pod., zde byl prodej esperantských publikací a výrobků (psací stroje, čokoláda, inkoust, kravaty, jehlice atd.), jež čilí obchodníci označili markou »Esperanto«. Veliký sál ve »Vereinshausu« nádherně vyzdobený pestrobarevnými prapory a odznaky nejrůznějších států, byl místem pracovních schůzí a plesu. K obědu shromažďovali se kongresisté většinou v Central Theater Tunnel, ač mnozí obědvali i jinde. My Češi po většině scházeli jsme se v Hotelu Stadt Waimar, kde chutné obědy měli jsme s — českou obsluhou a kde někteří z nás i bydlili.

Takový byl zevní rámeček kongresu. Obrátme se teď ke kongresu samému, k jeho průběhu! (Pokračování.)



SIGNIFO DE L. N. TOLSTOJ.

De Dro Frant. Krejčí.

(Fino.)

Kontraŭ tio ĉi vidiĝas la instruo de Tolstoj tute alie ol kontraŭ la doktrinoj de la moderna socio, kiuj celas assekuri al apartaj sferoj superrajton, kiu estas maljustaĵo. Tiu moderna socio, eĉ kiom ĝi estas reprezentata en Rusujo, vidas en Tolstoj revoluciulon same kiel en sociala demokratio, kaj tamen: oni ekpensu, ke al la rusa popolo aperus

profeto predikanta: Estu malmolaj!, ke li flamigadus ĝian naciecan fanatikecon kaj proponus al ĝi la tutan mondon kiel kaptajon, ke li dirus al ĝi mallonge: Vi estas potenca, forta; vi bezonas sole ekskui sin kaj vi deĵetos la katenojn, kiuj vin ĝenas! Al Tolstoj oni kredus, se li predikus tiel, kaj kio devenus el senkatenigo de pasioj de tiaj amasoj? Sed li predikas: Ne kontraŭstaru la malbonon per malbono. Li kvietigas la ribelon de la krudaj instinktoj, forprenas al la egoismo la fundon tuj en la komenco, volas venki la mondon per la amo. La devizo: egaleco, libereco, frateco, kiu en okcidento, ankaŭ ĉe ni, estas esprimo de kasteco kaj de nacieca egoismo rilatigante la leĝon de l'amo sole al la malgranda parto de la homaro kaj permesante subpremi ĉion malpli fortan: tiun devizon Tolstoj ĝeneraligas en la sama senco, en kiu ĝin originale instruis Kristo.

Tio ĉi estas *slava* filozofio en estanteco kaj Slavaro estas sufiĉe forta por, efektiviginte la reformon socialan unue ĉe si, devigi al ĝi la tutan mondon. Slavoj en sia longa evolucio historia direktiĝis certe kiel aliaj nacioj per la devizoj egoist-naciaj, ili estis almilitantoj, ili estis malmolaj kaj senkompataj, kaj la oficiala politiko de la plej potenca nacio ne diferencas de la politiko de aliaj nacioj, ĝi estas ekspansia, ofensiva. Kontraŭe ĉe aliaj nacioj ne mankis eminentaj viroj, kiuj instruis kaj instruas idealojn de la nobla humaneco, de la sama amo kiel Tolstoj. Sed certe havas signifon tio, ke kiam ajn kaj kie ajn Slavoj per siaj eminentaj viroj esprimis al la mondo sian idealon, ĝi estis ĉiam idealo tuthomara, idealo de l'egaleco de ĉiuj homoj kaj de la reciproka amo, idealo de la humaneco. Tio estas klarigata ĉe la malpli grandaj branĉoj de la slava trunko, kiel ekzemple ĉe ni Bohemoj (Chelčický*, bohemiaj fratoj ĝenerale, Komenský-Comenius, Kollár, Havlíček, Smetana, Masaryk) aŭ ĉe Poloj (mesianismo, Sienkiewicz), per tio, ke en timo pri l'ekzisto de la nacio kaj en konscio de sia malgrandeco ili serĉas en humaneco — en natura homa rajto — la garantion de la pli bona estonteco. Ĉe la potenca nacio rusa tio estas klarigata per la malfruiĝo en kultura evolucio kaj scio pri la kultura dependeco de aliaj nacioj; la sekvo de tio antaŭ ĉio estas la

*) Pri la identeco de siaj opinioj kun »Sís' víry« (Reto de la Kredo) de Chelčický (XV jarcento) Tolstoj estis atentigita de prof. Masaryk kaj rimarkigas tion en la unua ĉapitro de la verko »Savo en vi«. La similecon kun Smetana mi montris en la verko »O filosofii dr. Aug. Smetany«.

peno fariĝi egala al la aliaj kaj tiu peno enhavas la konfeson de ilia egalvaloreco.

Oni klarigas tion ankaŭ per tio, ke la slavecon reprezentas propre la popolo, dum la pli supraj sferoj (ĉe ni, en Polujo, en Rusujo) vivas en spirito neslava; kaj la popolo estis sklavigita sociale kaj spirite, tial, vekigante al memstareco, ĝi sopiras antaŭ ĉio je egaleco.

Sed tiu ĉi cirkonstanco estas vera pruvo, ke Slavoj estas per la evolucio destinitaj esti portantoj kaj gardantoj de la ideoj tuthomaraj. La evolucio devigas Slavojn al la filozofio humaneca kaj kiel longe staros kontraŭ si Superhomo kaj la principo »ne kontraŭstaru la malbonon per malbono«, egoismo kaj sana altruismo, tiel longe prave la humaneco estos filozofio slava.

Ĝia reprezentanto en la nuntempa mondo estas Tolstoj.

El la bohema lingvo tradukis J. Holub.



IDEO DE J. A. COMENIUS PRI LA LINGVO UNIVERSALA.

Originale verkis Jos. Krumpholtz.*)

(1. daŭrigo.)

Kaj kio igis Comenius, ke li tiom da kara tempo kaj fortoj oferis por la ideo, kiu ankoraŭ hodiaŭ, post pli ol 250 jaroj, elvokas rideton eĉ de iuj homoj alie saĝaj, sed forgesantaj, ke ne unu opinio, kiu ŝajnis antaŭe malsaĝa, poste, per sperteco, montris sin esti la vero kaj eĉ la saĝaĵo kaj ke, *kio ekzistas, estas sekve ebla?*

Tiuj kaŭzoj kaj motivoj estis kelkaj. Unuj el ili estis internaj, aliaj eksteraj. El internaj estis tio precipe kaj ĉefe la sopiro de Comenius pri la komuna, universala bono, lia sopiro pri la reciproka amo, toleremo, pacamo kaj unuiĝo de homaro — almenaŭ kristana — mallonge: penado de Comenius pri la plibonigo de la mondo, kio estis la celo de lia pansofio (ĉioscio) kaj vivo. Kaj el ĉi tiu lia penado kaj celado ekfontis lia tuta pensado kaj penado, kaj tiel

*) Represo aŭ traduko de tiu ĉi artikolo estas permesata, se oni citas la nomon de la aŭtoro kaj la gazeton »Český Esperantista«. Laŭeble oni sendu al ni du ekzemplerojn.

Rim. de la redakcio.

ankaŭ lia penado pri la antefarita lingvo universala, per kiu oni devis kulturadi la pansofion kaj disvastigadi lumon de saĝo kaj civilizacion universalan inter ĉiuj nacioj, eĉ plej malcivilizitaj, kaj tiel prepari kaj ebligi la repacigon kaj unuiĝon de homaro, la reformon de la mondo.

Comenius parolas pri tio en sia verko »Via lucis« (Vojo de lumo), montrinte la signifon de la greka kaj latina lingvoj por la disvastigado de l'evangelio kaj kiel la diverseco de lingvoj estas granda malhelpo de homara reciprokeco, unuanimeco, kulturado de sciencoj kaj artoj kaj de disvastigado de vero ktp.: »Do neeviteble ankaŭ nun, *ĥiam ni serĉas ĥaj esperas reformon de la tuta mondo*, estos bezona al tiuj, kiuj disdonos lumon de saĝo, donaco de la lingvoj, aŭ *estos bezona al diversaj nacioj ia unu lingvo ĥomuna*. Kaj tio ambaŭ, kvankam ŝajnas esti neebla, tamen ne estas tia; la lasta estas ankaŭ pli facila ol la unua, ĉar pli facile povas ĉiuj ellerni ion unu, ol iu unu ĉion«. »Do estas absolute necese antaŭe elekti tiun vojon, ke oni formu ian lingvon por la tuta mondo komuna«, kaj »tial scienculoj devos ĉiamaniere pripensi la manieron, kiel krei (formi) ian unu lingvon, per kiu interparolus ne sole ili mem, sed kiun ankaŭ kiuj ajn nacioj (eĉ tro nekleraj) povus facile ellerni«.

Ĉar, »nehavante ligilon komunan, kiel rilate al korpoj tiel rilate al spiritoj ni estas disigitaj, kaj ne interkomunikiĝante (kiel estus eble, se ni estus unu nacio kun unu lingvo), ni tre multaj nacioj ne konas nin kaj niajn bonajn kaj malbonajn aferojn. Tial ni ne povas eĉ malbonajn aferojn bonigadi kaj al ni helpadi eĉ bonajn pruntadi kaj sciigadi«.

Kaj »ĉu ne estas malhonore, ke ni tiel malmulte konas nin kaj niajn bonajn kaj malbonajn aferojn?« — Ke »kiel per religio tiel per riveroj, maroj, montoj, lingvoj, moroj ni diferencigâs senfine?« (De rerum humanarum.)

Sed »ĉar ĉiun multon oni devas iel unuigi«, ĉar »kunigi estas io pli dia ol disigi« — »forte staras nia deziro, ke oni elektu unu lingvon, per kiu ĉiuj nacioj ĥomune parolu kaj plimultigu reciprokajn interrilatojn« kaj »kiu estu pli facila ol ĉiuj lingvoj konataj, por ke oni povu ĝin ellerni sen perdo de la tempo kaj objektoj.« (Meth. lingv.) — »Alia, pli taŭga kuracilo por multeformaj difektoj kaj konfuzoj de homoraj interrilatoj, naskiĝantaj el multego, malfacileco kaj neperfekteco de lingvoj, ne ekzistas«. (Via lucis.) (Daŭrigo.)

LA BELULINO KAJ LA BESTO.

Malnova franca fabelo de s-ino *Leprince de Beaumont*.

Estis foje tre riĉa komercisto. Li havis ses infanojn, tri filojn kaj tri filinojn, kaj ĉar tiu komercisto estis saĝoplena, li nenion ŝparis por la edukado de siaj infanoj kaj donis al ili ĉiuspecajn instruistojn. Liaj filinoj estis tre belaj; sed la plej junan precipe oni admiradis; kiam ŝi estis malgranda oni ŝin nomis »la Belulino« kaj ĉiam ŝi konservis tiun ĉi nomon, kio treege ĵaluzigis ŝiajn fratinojn; ĉi tiu knabino, kiu estis la pli bela ol ŝiaj fratinoj, ankaŭ estis la pli bona ol ili. Ankaŭ la plej maljunaj filinoj montris grandan fierecon pro sia riĉeco; ili ŝajnigis sin grandsinjorinoj kaj rifuzis akcepti la vizitojn de aliaj filinoj de komercistoj. Sole la personojn de nobela deveno ili toleris en sia societo. Ĉiutage ili ĝuadis balon, komedion, promenadon, mokante sian pli junan fratinojn, kiu la plej grandan parton de sia tempo uzadis en la tralegado de bonaj libroj. Ĉar oni sciis, ke tiuj fraŭlinoj estas riĉaj, multaj gravaj komercistoj ilin petis pri la edziĝo; sed la plej maljunaj respondis, ke neniam edziniĝos, sole se ili renkontos dukon, aŭ almenaŭ grafon. La Belulino, (ĉar mi jam diris al vi, ke tia estis la nomo de la plej juna), la Belulino ĝentile dankis tiujn, kiuj celis edziĝi kun ŝi, sed ŝi diris, ke ŝi estas tro juna kaj deziras fari societon al sia patro dum kelke da jaroj.

Subite, la komercisto forperdis sian tutan posedaĵon kaj konservis sole malgrandan kampodomon malproksime de la urbo. Plorante, li diris al siaj infanoj, ke ili devas iri por loĝadi en tiun ĉi dometon, kaj ke nur se ili laboros, kiel kamparanoj, ili sukcesos tie vivadi. La du unuaj filinoj respondis, ke ili ne volas forlasi la urbon, ke ili havas multajn amindumantojn, kiuj estos tro feliĉaj ilin, eĉ senmonajn, akcepti kiel edzinojn. Eraris ja la bonaj fraŭlinoj! Iliaj amindumantoj ilin jam ne volis rigardi, kiam ili fariĝis malriĉaj. Ĉar neniu ilin amis pro ilia fieregeco, oni diris: »Ili ne meritas kompaton. Ni estas tre feliĉaj, ke disbatiĝis ilia malhumileco; ili nun ŝajnigu sin grandsinjorinoj, paŝtante ŝafojn!« Sed samtempe oni aldonis: »Pri la Belulino, nin tre malĝojigas ŝia malfeliĉo; ŝi estas tia bonulino! Ŝi tiel bonkore alparolis la mizerulojn! Ŝi estis tiel aminda kaj ĝentila!«

Eĉ troviĝis kelkaj nobeloj, kiuj deziris edziĝi kun ŝi, kvankam ŝi ne posedis eĉ unu moneron; sed ŝi respondis, ke

ŝi tute ne povas lasi sian mizeran patron en lia malfeliĉo, ke ŝi do lin sekvos sur la kamparon por lin konsoli kaj helpi en la laboro.

La kompatinda Belulino komence malĝojis pro la perdo de siaj riĉaĵoj, sed ŝi diris al si mem: »Eĉ se mi ploregos, tio ne rehavigos al mi la perditajon; mi do devas peni esti feliĉa, kvankam senmona.«

Kiam ili alvenis al la kampodomo, la komercisto kaj liaj tri filoj ekplugis la teron. La Belulino leviĝis je la kvara matene kaj rapidis purigi la loĝejon kaj pretigi la manĝon por la tuta familio. Unue, ŝi treege klopodis, ĉar ŝi ne kutimis laboradi kiel servistino; sed, post du monatoj, ŝi fariĝis pli fortika kaj la laciĝo donis al ŝi bonegan sanon. Kiam ŝia tasko estis plenumita, ŝi legis, ŝi ludis fortepianon aŭ ŝi kantis, ŝpinante. Dume ŝiaj fratinoj morte enuadis; ili vekiĝis je la deka matene, promenadis la tutan tagon kaj kvazaŭ plezuriĝadis bedaŭrante pri la luksaj vestaĵoj kaj la iamaj societoj. »Vidu nian plej junan fratinojn«, ili diris inter si »ŝi havas malnoblan animon kaj estas tiel malsprita, ke ŝi kontentiĝas pri sia malfeliĉa stato!« La bona komercisto ne samopiniis kiel liaj filinoj; li sciis, ke la Belulino, pli ol ŝiaj fratinoj, estas inda brile aperi en la societoj; li admiris la virton de tiu knabino kaj precipe ŝian paciencon; ĉar ŝiaj fratinoj ne sole forlasis al ŝi la tutan mastrumadon, sed ŝin insultis ĉiumomente.

De unu jaro ĉi tiu familio vivadis en izoleco, kiam la negocisto ricevis leteron lin sciigantan, ke ŝipo, sur kiu li havas komercaĵojn, feliĉe albordiĝis. Tiu sciigo apenaŭ ne konfuzis la cerbon de la plej maljunaj filinoj, kiuj pensis, ke ili fine povas forkuri de tiu ĉi kamparo, kie ili tiel enuegas! Kaj kiam la patro estis tuj forironta, ili petis, ke li alportu al ili robojn, peltojn, kapornamaĵojn, kaj ĉiuspecajn bagatelojn. La Belulino nenion petis, ĉar ŝi pensis en si mem, ke la tuta mono liverota de la komercaĵoj ne sufiĉos pagi ĉion, kion ŝiaj fratinoj deziras.

— »Vi ne petas, ke mi aĉetu ion por vi?« demandis ŝin la patro.

— »Ĉar vi estas tiel bona kaj atentis pri mi — ŝi respondis — mi petas vin, ke vi alportu al mi rozon, ĉar tiaj floroj ĉi tie ne kreskas.«

La Belulino ja ne deziris havi rozon; sed ŝi ne volis, per sia ekzemplo, ŝajne riproĉi la konduton de siaj fratinoj, kiuj dirus, ke sole por igi sin rimarkinda, ŝi postulas nenion...

La bonulo foriris; sed kiam li alvenis, oni faris al li proceson pri liaj komercaĵoj, kaj post multe da klopodoj li revenis tiel malriĉa, kiel antaŭe. Li estis nur je tridek mejloj de sia domo kaj jam li ĝojis, ke li baldaŭ revidos siajn infanojn; sed ĉar li devis trairi grandan arbaron antaŭ ol alveni hejmen, li vojeraris. (Daŭrigo.)



RAPORTOJ KAJ NOTIZOJ.

Universala Frateco. Kortuŝita per la malĝoja sorto de Slovakoj kaj de aliaj subpremataj nacioj s-ro *Emile Peltier* (Sainte-Radegonde, Indret-et-Loire, France) proponas unuigi la humanajn homojn, kiuj volus helpadi al la subpremataj popoloj, klasoj ktp. Li proponas fondi la unuigon »Universala Frateco,« kies celo estus — laŭ lia unua cirkulero — »laboradi per libroj, broŝuroj, naciaj ĵurnaloj, speciala gazeto de U. F. por plibonigi la sorton de malfeliĉaj klasoj, de laboristoj, de subpremataj popoloj, informi la mondon pri la barbareco de iuj registaroj, alvenigi la regnon de plia justeco kaj frateco en la mondo.« La proponon de l'organizo li prezentos en dua cirkulero, kiun li sendos al ĉiu aliĝinto. Kiu volas dediĉi iom da laboro por la aplikado de la humanecaj principoj, partoprenu en ĉi tiu entrepreno kun celo tiel nobla! *Bšk.*

Kultura societo Babel. La bohema propagandanto de la ideo pri interrilatiĝo de la malgrandaj nacioj, precipe de nacioj bohema kaj dana, Dro A. Kraus, profesoro de bohema universitato en Praha, parolante antaŭ nelonge en Kopenhagen pri la situacio kaj kulturo de la nacioj malgrandaj proponis unuigi la personojn, kiuj konas la lingvojn de tiaj nacioj en »Kultura societo Babel«, kiu plifaciligus la interkonatiĝon kaj interrilatojn inter la nacioj malgrandaj. Dubante pri la ebleco de la lingvo internacia, opiniante, ke la nacioj ne povas elparoli esperanton egale, certigante, ke esperanto havas multajn erarojn, la bohema danofilo rekomendas al la malgrandaj nacioj la rezignacion kaj la reciprokan lernadon de siaj lingvoj. Ankaŭ konvinko, sed malmulte inda de universitata profesoro. Al tio mi dediĉas malgrandan rimarkon en la bohema parto de nia revuo. *Bouška.*

La uzado de esperanto por la korespondado kun fremdularo estis akceptita de »Ligo de senkonfesiaj Bohem-slavoj«, kies membroj diligente vizitas la kursojn pri esperanto en Praha. *J. Barviř.*

